

PENSEO

N-ro 280

feb. / 2015

Monata Beletra Revueto en Esperanto

Honorita de Premio Grabowski,1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 26-a jaro http://www.elerno.cn/penseo/penlisto.htm

Anteo (Ĉinujo)

akcidentaj okazaĵoj

manĝante pomon, mordis mi la langon.
en kliniko kuracisto ridis jen senĉese:
ĉu pro la franca kisado kun la...? ne?
antirabian likvon injekti — necese.

2012.11. 8 - 11

danke al gas-kono

la oreloj al mi zumas.
tion mi prenas por ĉielaj tondroj.
ombrelo necesas?
balonoj pluvas en la vidon.

2012.11. 8 - 2

***gaskon/o** *1 Loĝanto de Gaskonio. 2 (f pro ark. Tradicio) Fanfaronulo. (PIV)*

URINOREO

la akvo fluis el la krano dorma
kaj etendiĝis de la lito al la murpiedoj.
domtremo. mi vekiĝis kun konsterno.
feliĉege la ur-ino ĉe mi ronronis plu seka.

2012.11. 9 - 4

***ore/o** *[medi.]Troa produktado k/aŭ senvola ellaso de organisma likvo: salivoreo, spermoreo, urinoreo = enurezo.*

****ur/o** *[zool.] Sp. de bovo Bos primigenius, SIN. Bos urus, formortinta antaŭ kelkcent jaroj, de kiu devenas ĉiuj rasoj de domaj bovoj: la grizbarba uro hirtigas kolhararon G. PIV*

aŭtuna ekskurso kun gejunuloj

frapas la pluvo primavera
sur la aŭtunan kranion,
igas min senti vintran glacion
kaj sopiri al fajro somera.

2012.11.10

Paŭlo Silas (Brazilo)

SENFINA KONFORMIĜO

Psiko pasinta svenas ĉimomente.
Intaj ligiloj havis ĝi tro da.
Provas viviĝi nova sistem' de
Penso sen mensa nodo malnovmoda.

Falo fatala staras evidente.
Fini fiksitan formon kun klopod' al
Vek' de l' pli pova prava hompretend' el
Ĉiuj celantaj ŝanĝon periodan.

Voĉoj alternas orde, harmonie;
Tamen ankoraŭ laŭte, plorokrie,
Utopiec' alvokas la perfekton;

Volas nuligi dubon kaj malcerton,
Fari fekunde viva ĉiun tagon
L' ekspluatitan akvomankan agron.

RIBELA IDO

La Terpatrino dum akuŝdoloro
Ion antaŭsentis kun rezigno:
Progres' kontraŭa al Natura volo
Nur malbonon kreas, ne la dignon.

Eliros trafe al la sino, koro,
La rustita spado el la ingo.
Ŝi ploros perdon de patrina rolo
Kvazaŭ tranĉis ankaŭ ŝin la klingo.

Vana provo teni ĝin en paco.
Bedaŭr' en daŭra kontraŭflua vojo.
Ĉu pentri belon sur statu' el vakso?

Flugi ĉirkaŭ ĉiamvolva akso.
De l' Infer', sidiĝ' en pordosojlo.
Ripeti peton: utopia paco.

Maria Nazaré Laroca (Brazilo)

Enamiĝo

Enamiĝo estas poetiĝi,
la sunon bridi, stelojn ŝteli
kaj ebriigi la lunon, ĝin volante
juvel' unika de l' muz' plej amata .

Enamiĝo estas malfariĝi,
inaŭguri l' abismon, adoleski;
kaj pro tia sorĉaĵo malsaniĝi
levite de l' teksaĵ' de l' estontec.

Enamiĝo estas plonĝi en spegulon
teksante la onton el la sento.

Ĉarm' estingita: sorto konstruata

Denove en karcero spontanea...
La amo velkas; ne la enamiĝo:
pli ol stato - jen vivoatestilo!

Juiz de Fora, la 5-an de Novembro de 2014.

Lotusfloro

Serĉante lumon,
floras lotusfloro
sur akvo ŝlimeja.

Kvazaŭ perloj,
brilaj akvaj gutoj
forglitas de l' folioj,
kiuj ĉiam puras.

Mia anim' sopiras
al la nobleco humila
de l' lotusaj floroj,
kiuj marĉon lumigas
per servad' al Dio.

Juiz de Fora, 12/11/2014.

Mori (Usono)

AFORISMe (3)

Amiko de l' homo
kun la menso de vulpo
kaj koro de lupo
baldaŭ trovos sin
en lia supo!

***

Loĝantoj sur Paradiza insulo
en fora ĉielo
rigardante al la Tero
deklaras, rigardu, vidu
tie estas la Infero!

***

Dum troviĝas azenoj
kaj muloj,
troviĝas ankaŭ
rajdemuloj!

***

Bestoj forpelis homon
el ĝangalo,
ĉar homo tie estis
la plej sovaĝa animalo!

***

Kia via mem-imago
en via koro,
tia via vivo
sur la tero.

***

Dum la mondon regas
mon' kaj kapitalo,
homoj vivas
laŭ l' leĝoj de l' ĝangalo.

Cezar (Germanujo)

La morta birdo Lante petas vin...

Mi, la morta birdo Lante, petas vin,
ke vi ne rapidegu tiom!
Ĉar ankaŭ birdoj tiaj
kiaj mi volas vivi,
senti ĝojon kiel vi.

Estu ĉiam
atentema!
La alia en tiu kazo
ja troviĝos.

Kaj, se vi denove
furioze ekrapidegos,
tiukaze tuj haltu,
metu la aŭton
al la vojrando
kaj observu nin,
la birdojn, kaj
niajn amikojn,
la nubojn.

Flugu kun ni,
kun nia sopiro,
tute sen hasto.

Utila imago

Imagu,
ke vi sidas en domo malnova
sur trivita plušsofo
kaj kun la rigardo al kurbigita
blanke lakita ferolito.
Iu ĝuste forŝaltas la sunon
kaj alia alvenas kaj tranĉas
la koron el via brusto,
viro, kiu trovas ĝin plezuro
poste montri al vi la tranĉilon,
kaj sur manplato vian koron,
kiu batas ankoraŭ.

Imagu,
kiel vi miras pri tiu viro,
kiu havas falsan dentaron kaj aspektas
kiel la ludomastroj
en la tv-elsendaĵoj.

Vi devus esti morta delonge,
sed vi vivas plu kaj plu...

Imagu,
ke kreskas sur la vizaĝo de la viro
subite felo kaj, ke liaj okuloj
fariĝas strioj.
Kaj kaputa sondiskilo
komencas ludi:
"Mi la fraŭlinon Madlejn'
vidis sen pen'
en ban' ... krk ... pro ben'.
en ban' ... krk ... pro ben'.

Imagu,
ke vi havas spegulon ĉe vi
kaj vi tenas la spegulon al la monstro,
kaj la monstro ridas kaj ridas,
ridas kun via koro en unu mano
kaj la tranĉilo en la alia mano.
Kaj la kaputa sondiskilo grate turniĝas:
Videblis suroj jen,
nudban-scen'...
suroj jen,
nudban-scen'.

Imagu, kiel la viro kun la falsa dentaro
aliras vin kaj vin tuŝas
per siaj spongecaj manoj,
kaj vi estas rigida kiel pupo,
kaj li ĵetas vin simple de la pluŝsofo
kaj vi kuŝas kun la rigardo
al la kurbigita ferolito
kaj la sondiskilo grate turniĝas
kaj la sondiskilo grate turniĝas
kaj la...

Imagu tion al vi,
ĝi povus esti utila por vi.

Jadranka Miric (Serbujo)

Januara ĉielo

Vintra kaprico.
De frosta neĝa veter'
ĝis aprilvarmo.

Ĉiel' severas.
Nuboj vagas en ĉiel'
ventbalaitaj.

Ruĝiĝis ĉiel'.
Estos suna vetero,
laŭ tio ..Venta.

Nuboj malaltaj.
Ventokoko turniĝas
sudokcidente...

Trompa ĉielo..
.La vetero varias
Vintro vulpinas..

Siv Burell (Svedujo)

Rubaĵo

Rubaĵoj por vi,
memoroj por mi,
rubaĵo por mi,
grave por vi.

Objektojn ni gardis,
kiuj ŝajnis antikvaĵoj,
sed gefiloj ne ardis
zorgi pri "relikvaĵoj".
Nur tempo al ili mankas.

Ilustraĵo de la aŭtorino

Ni nin mem punas
Kaj ne bone juĝas pri valor'.
Ne ĉiu "antikvaĵo" al valoro kunas,
Do ĵetu la rubaĵon kun fervor'.

Marcus Vinicius de Moraes*

Apartiga soneto

Tutsubite, la rid' iĝis plorŝiro,
brumece blanka ploro kaj silente.
La buŝkuniĝo ŝaŭm' iĝis tradente,
kaj ĉe l' streĉo de l' manoj ekis miro.

Tutsubite, la kvieton postis vento,
kun viŝo al l' okula lasta flamo.
El la pasi' naskiĝis antaŭsento,
kaj jam incide al ĝi ekis dramo.

Tutsubite, ne pli ol tutsubite,
iĝis tristo kio iam amoris,
kaj senhelpe kio statis ekscite.

La kunpartiĝanto nun fride foris,
la viv' iĝis fuŝ', plene sensaporis.
Tutsubite, ne pli ol tutsubite.

** Marcus Vinicius de Moraes (1913 - 1980) I.a. li estis brazila diplomato, poeto kaj teatra aŭtoro. Ĉi soneto ankaŭ iĝis konata en mia lando kiel kanzono muzikigita de Tom Jobim (endiskigita de ĉi lasta en duopo kun Elis Regina)*

Esperantigis

Ŭel Roŝa (Brazilo)

Zhuangzi (369-286 a.K)

Zhuangzi

ĈAPITRO DUA

La egaleco de ĉiuj estaĵoj

§02-01

Nanguo Ziqi sidis sin apogante al tableto. Li rigardis supren al la ĉielo kaj milde spiradis kun tute senesprima mieno, kvazaŭ lia animo forlasus lian korpon.

Lia disĉiplo Yancheng Ziyou, kiu staris servopreta apud li, diris: "Kio nun estas al vi? Ĉu vere la korpo povas fariĝi kiel sekiĝinta ligno, kaj la menso kiel mortinta cindro? Vi nun, apogante vin al la tableto, aspektas ne tiel same, kiel antaŭe!"

"Yan," diris Ziqi, "tre bona estas via demando!" Ĵus mi perdis min. Ĉu vi tion komprenas? Vi aŭdis pri la homa muziko, sed ne pri la tera; vi eble aŭdis pri la tera, sed ne pri la ĉiela, ĉu?"

"Bonvole," diris Ziyou, "donu al mi klarigon pri ĉi tiuj tri."

"La spiro de la universo," diris Ziqi, "estas nomata la vento. Iafoje ĝi estas neaktiva. Kaj kiam ĝi leviĝas, sonoj koleraj eliĝas el ĉiuj aperturoj. Ĉu vi ne aŭdis la kreskantan ventomuĝon? Sur altaj montoj staras gigantaj arboj kun aperturoj kaj kavoj en si, kiuj similas naztruojn, buŝojn, orelojn, trabotruojn, pokalojn, pistujojn, lagetojn, kaj flakojn. La vento impete blovas en ilin, estigante la sonojn de akvotorento, de siblantaj sagoj, de laŭtvoĉaj riproĉoj, de spiroj, de krioj, de ploro, de profunda lamento, de kortranĉa veado. El tiuj sonoj iuj estas akraj, iuj profundaj.

Ventetoj naskas malfortajn harmoniojn, ventegoj fortegajn. Post kiam pasas la furiozaj ventoblovoj, la aperturoj malpleniĝas kaj senbruiĝas. Ĉu vi ne iam vidis la fleksiĝojn kaj tremadon de la brancoj kaj folioj?”

“La tera muziko,” diris Ziyou, “estas la sonoj el diversformaj aperturoj; la homa estas la sonoj el diversaj ŝalmoj kaj flutoj. Kio do, permesu al mi demandi, estas la ĉiela muziko?”

“La ĉiela muziko estas la sonoj de la sama vento, kiu igas miriadojn da aperturoj produkti diversajn sonojn. Ĉiu aperturo eligas sian apartan sonon. Kiel do povus ekzisti io alia, kio estigus tian muzikon?”

§02-02

Granda sciado estas vasta kaj ampleksa; malgranda sciado estas nekompleta kaj limigita. Granda parolo estas pompa kaj potenca; malgranda parolo estas ne pli ol babilo. Kiam oni dormas, la animo estas en konfuziteco; kiam oni vekiĝas, la korpo estas en moviĝo. En la rilatoj interhomaj estas komplotoj kaj intrigoj, kaj ĉiutage okazas menso-kontraŭ-mensaj luktoj. Estas hezitemo, insidemo kaj rezerviĝemo. Malgrandaj timoj kaŭzas turmentan maltrankvilon, grandaj timoj senfinan teruron. La menso de iuj flugas kiel sago, cele al alies pravo kaj malpravo. La menso de aliaj restas firma, kiel silentema ĵurinto, por gardi siajn rajtojn akiritajn. La menso de iuj velkas kiel planto en aŭtuno kaj vintro, plikonsumiĝante kun ĉiu tago. La menso de aliaj dronas en sia aktiveco kaj ne povas reveni al sia naturo. La menso de ankoraŭ aliaj hermetike enfermas sin en sia memo; ĝi estas proksima al morto kaj neniel povas revigliĝi.

Ĝojo kaj kolero, malĝojo kaj plezuro, maltrankvilo kaj bedaŭro, kaprico kaj decidemo, facilanimeco kaj trosenĝeneco, patoso kaj afektemo: ĉio ĉi tio venas kiel muzikaj sonoj eliĝantaj el malplena tubo, aŭ kiel fungoj elkreskantaj el varmo kaj humido. Tage kaj nokte ili alternas interne de ni, sed ni ne povas diri, kiel ili naskiĝas. Ba, lasu! En la momento, kiam ni atingos la ekkomprenon, ni povos tuj eltrovi, kiel ili estiĝas.

Sen la emocioj supremenciitaj ne ekzistus mi, kaj sen mi ili ne povus esti esprimitaj. Tio ŝajnas vera. Sed mi ne scias, kio ilin kaŭzas. Ŝajnas, ke ekzistas efektiva Sinjoro, sed estas nenia signo de Lia ekzistado. Oni povas kredigi al ni, ke Li ekzistas, sed ni ne vidas Lian formon. Eble Li havas efektivecon, sed nenian formon.

§02-03

La cent partoj de mia korpo, kun ĝiaj naŭ aperturoj kaj ses visceroj, estas kompletaj ĉiu en sia loko. Kiu el ili do estas la plej kara al mi? Ĉu ili ĉiuj egale plaĉas al vi? Aŭ ĉu plaĉas al vi unuj pli ol la aliaj? Ĉu ili ĉiuj estas servistoj? Ĉu ili, kiel servistoj, ne povas regi unuj super aliaj? Ĉu ili fariĝas regantoj kaj servistoj laŭvice? Ĉu ekzistas iu vera reganto inter ili? Koncerne ĉi tiujn demandojn, tute egale, ĉu ni povas alveni al ĝustaj respondoj aŭ ne, la realeco de iu reganto, se tia ekzistas, restas la sama sen pliiĝo aŭ malpliiĝo.

Post kiam ni ricevas la korpan formon, ĝiaj partoj ne ĉesas plenumi ĉiu sian funkcion, ĝis venas la morto. En konflikto aŭ harmonio kun mondaj estaĵoj aŭ aferoj, ili sekvas ĉiu sian vojon kun rapideco de galopanta ĉevalo, kaj ne povas esti haltigitaj. Ĉu tio ne estas bedaŭrinda? Ĉiu el ni konstante penlaboras dum sia tuta vivo, ne vidante la frukton de sia laboro; laca kaj elĉerpita, li ne scias, al kia celo iri. Ĉu tio ne estas plorinda? Oni diras, ke la homo povas esti senmorta. Sed kian utilon havas tiu ĉi senmorteco? Kiam la korpo putras, la samo okazas ankaŭ al la spirito. Ĉu tio ne povas esti lamentinda? Ĉu la homo estas tiel malklarmensa dum sia tuta vivo? Ĉu mi estas la sola, kiu estas malklarmensa, dum troviĝas aliaj, kiuj ne estas tiaj?

02-04

Se oni devas esti gvidata de siaj opinioj,

kiu do ne havus tian gvidon? Opiniojn havas ne nur tiuj, kiuj scias distingi la pravon de la malpravo kaj teni sin je ĝi, sed ankaŭ tiuj, kiuj estas malsaĝaj. Se oni penas fari distingon inter la pravo kaj la malpravo antaŭ ol havi sian propran opinion, tio estas tiel absolute neebla kiel tio, ke oni iras hodiaŭ al la regno Yue kaj tamen jam alvenis tien hieraŭ. Tio signifas, ke oni prenas la eston por la neesto. Tiuokaze estus neeble eĉ por la saĝa reĝo Yu tion kompreni, des malpli por mi.

Elĉinigis

Wang Chongfang (Ĉinujo)

Ĉineske

Vejdo (Ĉinujo)

Gruo kaj konko

ĉina antikva fablo
—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

Sur strando
jen kun valvoj du
malfermitaj la konko
sunumas sin kun plenĝu’
sen ajna enu’.

La gruo
gvatas avide
je ŝia franda karno.
Li alflugas rapide
ŝtele inside.

Abrupte
per tuja movo
li pinĉas ŝian karnon
firme kun beka ŝovo
— rekta manovro.

La konko
tuj fermas bate
siajn du valvojn strikte,
la bekon senkompate
mordas malŝate.

La gruo
diras cinike:
“Se ne pluvos hodiaŭ,
nek morgaŭ tutefike,
jen vi panike

timtremos
je venanta mort’
pro la manko de akvo,
elĉerpiĝos via fort’
laŭ l’ malbona sort’.”

Replikas
la gruo ruze:
“Se mi ne forlasas vin
en du tagoj rifuze
kaj malekskuze,

vi mortos
triste mizere
pro manko de manĝaĵo
kaj malsat’ vin infere
molestos vere.”

Ili du
ne volas cede
kompromisi unue
sed nur disputas plede
ve, senrimede.

Fiŝisto
aliras ŝtele
forkaptas ilin ambaŭ.
Kiel agas malbele
ili kverele!

Ilustraĵo de Tatjana Ĥomjakova

2015-01-17

Eto (Ĉinujo)

Vento en vintro

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

Vent’
vintra en frosta ferment’
ekblovas
el la firmament’.

Son’
ulula per akra ton’
surdigas
en brua impon’.

Vip’
dura batas en disip’
malvarme
jen ĝis homa rip’.

Hom’
kaŝiĝas cede en dom’
kontraŭ ĝi
kvazaŭ frid-fantom’.

Ve,
homojn al cerba pane’
ĝi pelas
sen bona ide’.

**Sopir-al-sudo: ĉina fiksforma poemo el kvin versoj de 35,77,5 silaboj laŭ rimaranĝo xa,xa,a (x=senrima).*

Lily (Ĉinujo)

Sur herbejo

—laŭ ĉinesko Dekses-Silabo*

Lun’
brilas super herbej-dun’,
nin tentas
la herboj de jun’.

Vent’
friska el la orient’
ekblovas
je nia kontent’.

Ni
jam kisas nin kun pasi’
korpglue
tute en ebri’.

Sub
atak’ amsenta sen dub’
humidas
suke mia pub’.

Ĝem’
aŭdiĝas pro korpa trem’
komforte
ĉe vira ekprem’.

Tir’
forta kuŝigas sen dir’
min dorsen
sur herbojn sen spir’.

Li
agas krude en mani’
langlekas
min kun softa kri’.

Jen
li palpas per man-promen’
jen knedas

mamojn de plenplen’.

Jam
mi molas pro seksa flam’
senforte
sur herba tatam’.

Nun
ni tute nudaj en kun’
tordiĝas
en stringa brakum’.

Kac’
erektas dure sen lac’
simile
al krab-karapac’.

Suk’
mia kvazaŭ laŭ konduk’
fluetas
per tub’ de kaŭĉuk’.

Flam’
volupta kiel cunam’
eksplodas
el muĝa dinam’.

Sur
mi pezas li en murmur’
kun kaco
en mi kun plezur’.

Kri’
laŭta ŝprucas en seri’
pro piŝtad’
mania de li.

Du
ni tuj kolapsas sen bru’
senmove
ankoraŭ kun ĝu’.

For
ŝvebas ĝemkri’ en amor’
en aer’
post pena labor’.

**Dekses-Silabo: ĉina fiksforma poemo el kvar versoj de 1, 7, 35 silaboj, laŭ rimarangĝo a,a,xa (x=senrima)*

Guram Svanidze

Socia darvinisto

De iu tempo mia konato Gija similis laŭ mia opinio unu individuon – amiko de mia najbaro Griŝa – Viktoron.

Griŝa[1] rigardis Viktoron kiel ian *guru*[2]. Post alveturo el Moskvo li rakontis nur pri Viktoro. Interalie Griŝa estis pli aĝa ol Viktoro, sia samkursano en Moskva Ŝtata Universitato, je du jaroj.

Ilustraĵo de Tatjana Ĥomjakova

Mi memorfiksis unu epizodon. En ilia universitata medio unu junulo mortigis sin. Konspirante ridetante Griŝa rimarkis, ke li havas iajn suspektojn. La malfeliĉa homo havis malfortan karakteron. En aĝo de 19-20 jaroj li konsideris sin kiel senesperan malsukcesulon, malbone vestis sin kaj ne zorgis sin. Forta kaj celkonscia Viktoro rilatis al li tre severe. Post ilia interparolo la junulo fine konvinkiĝis, ke li estas taŭga por nenio homo.

Griŝa rakontis, ke *guru* kelkfoje parolis, ke li interkomunikiĝas kun Griŝa kiel kun malsukcesulo pro profito. Tiel infantinoj de hispana kortego ĉirkaŭis sin per kripla

servantaro aŭ aperis en ĉeesto de homoj kun dresitaj cerkopitekoj, por ke laŭ kontrasto kun ili elstaru per sia beleco. Kiel parolis Grišunja (tiel nomis lin Viktoro) en tiu momento li volis ĵeti sin sub veturantan aŭton.

Cetere tiujn rakontojn mi perceptis ne serioze. Mia najbaro en Moskvo en “prestiĝa” (laŭ liaj diroj) kompanio glutis kelkajn tablojdojn (“por tonuso”). Okazis nerva atako. Gregorion oni forveturigis reen al hejmo, al Tbiliso, por ke li “ripozu post lernado”.

Ĉar li estis snobo, li malbone atestis homojn. Sed troviĝis unu junulo, pri kiu li diris favore. Trakalkulante liajn kvalitojn Grišа speciale rimarkis:

– Mi estas certa, ke li ne okupas sin pri onanismo.

Mi ne povas juĝi, la “glora” epizodo estas normo en biografio de Viktoro aŭ ne. Sed por Gija tiaj diroj estas regulo. Oni plendis kontraŭ li: li iĝis kruela. Multfoje estis okazoj, kiam li senkompate riproĉis diversajn “malsukcesulojn”. Feliĉe tio okazis sen seriozaj sekvoj.

– Por kio kompati malsukcesulojn?! – Gija diris al mi per telefono. En sama telefona interparolo li diris, ke li estas malamiko de maldekstruloj kaj sindikatoj. “Ili dorlotas malsukcesulojn!”

Foje mi kaj Gija venis en parlamento laŭ aferoj. Apud ĉefa enirejo staris du grandaj viroj, ili havis simplan aspekton, laborumajn manojn, laŭ tiu okazo festan, laŭ ilia opinio, veston. Mi rekonis ilin kiel famajn metalurgojn el urbo Rustavi. Ili estis perpleksaj, eĉ ordenoj iel deflankiĝis. Ilin neniu akceptis. La viroj komencis kompreni, ke tempo ŝanĝiĝis, kaj ili jam ne ĉefa klaso kaj venis en alia parlamento. Unu el ili ne eltenis kaj ekploris, li diris, ke li estas malsata de hieraŭa tago, ke jen dum 9 monatoj ne estas laboro. Ofendo turmentis lin. La alia staris faltinte frunton. Ili dum tuta vivo laboris apud ferfanda fornego, fandis metalon...

– Leĝoj de merkato estas justa. Ili dislokis ĉion al siaj lokoj, – subite mi ekaŭdis rimarkon de Gija.

Mi memoras, ke Grišа parolis pri sia amiko-mastro kiel pri alta bela juna homo. Laŭ tiuj kvalitoj Gija ne similis al Viktoro (al Viktjunja, kiel mi nomis lin, kiam mokis al Grišunja). Dum spektaĵo en Tbilisa televido, en kiu li partoprenis, okazis amuza evento. Oponanta kontraŭ li pastro-retrospektivulo dum disputo diris kiel argumenton, ke novajn moralajn valoraĵojn en lando disvastigas sinjoroj kun tre malbelaj fizionomioj. Dum tio pastro montris al Gija kaj diris:

– Mi ne kontraŭas al ĉiu fizionomio aparte, sed mi parolas pri tendenco.

En respondo oni akuzis pastron en rasismo. Oni diris al li per kategoria tono, ke tiaj “fiobstinaj” kiel li malhelpas konstruadon de liberala demokratio en lando. Kiel mi eksciis, dum muntado de la spektaĵo oni forigis iujn epitetojn de la pastro, kiujn li adresis al Gija. Verŝajne pro ŝparado. Mian konaton oni nomis “la dikviandan” (pro lia dikeco). Ankaŭ oni parolis pri lia rideto. “Li ne insultas, sed li havas tre venenan rideton”, – diris pri li oponanto. Ĵurnalisto el opozicia gazeto daŭrigis tiun temon kaj rememoris rideton de ... Ĝokonda[3]. Estas en ŝi io dusenca, virino pene kaŝas en si sarkasma elemento. De iu tempo en televido oni ĉesis monrti plej skandalajn personojn. De ekrano malaperis neplibonigeblaj arogantuloj el reganta partio, kelkajn sinjorino-histeriulinoj kaj ankaŭ Gija. Tiel fari konsilis al registaro okcidentaj specialistoj pri kontaktoj kun socio. Specialistoj diris, ke ili ne devas reprezenti regantan rondon kaj ne povas dekori televida etero.

Verŝajne Gija fieris pro sia kariero kaj rigardis sin kiel “*self-made man*”-on[4]. Li suferis en juneco en malriĉa familio, sed nun li jam profesoro en universitato. En unu gazeto li gvidis rubrikon. Jen kie plene aperis lia

sarkasma karaktero! Ial oni pensis, ke li verkas analizajn artikolojn, sed fakte li verkis filipikojn. Oni devis fari diferencojn inter lia deziro objektive juĝi pri objektoj kaj absorbanta pasio de “analizisto” moki ajnan eventon.

Mi scias personon, kiu admiris karieron de mia konato. Tiun personon ĝis iu tempo oni oficiale rigardis kiel filozofon, li laboris en instituto. De tien oni forigis lin. Li faris teorion de “kakismo-ekskrementismo”. Tiu teorio havis sian hierarkion de ideoj. En supro estis kategorio “*kakis kaki*” – “merdo merda”, sub kiu li subkomprenis difinitan plej altan oficistan personon en ŝtato. “Unikecon” de Gija tiu filozofo ekvidis pro tio, ke en Romo li persone renkontiĝis kun fama itala verkisto. Gija, studento el Kartvelio, rakontis al verkisto pri gepatra Mengrelio[5]. Post tio leksiko de verkisto pliriĉiĝis per mengrelaj vortoj.

Filozofo rakontis al mi, ke renkontiĝis kun Gija en kompanio de pompa sinjorino.

– Li prezentis min kiel homon, kiu forte influis lian spiritan kreskon, – filozofo diris. Dum tio falintan en malfavoron filozofo konfesis, ke ne komprenis, ŝercis aŭ serioze parolis lia kamarado kun rideto de Ĝokonda.

Ŝajnus, de kiu tia mizantropeco de mia konato? Sed ja Gija estas teologo. Li staĝis en Vatikano. Oni povas supozi, ke prediko de dia vorto ne estas devo de teologo. Teologo simple povas scii ĝin. Sed kiel li apartiĝis de teologio kaj absorbiĝis pri trofiero?!

– Ĉu Gija estas ateisto? – mia kunparolanto konjektis. Ni, tri kunlaborantoj, manĝis pelmenojn kaj drinkis bieron en kafejo priparolante nian ĉies konaton. La alia rimarkis:

– Tio estas amuze. Sed plej probable li simple estas sociala darvinisto. Tamen malgraŭ tiu cirkonstanco li devis esti singarda kaj ne moki homojn demonstre.

Tie en kafejo mi ekmemoris pri Griŝunja kaj Vitjunja. En respondo mia kunlaboranto rakontis pri unu virino laŭ nomo Ketevan. Li trovis ion komunan inter ŝi kaj Gija. Ketevan gvidis ian usonan oficejon en Tbiliso. Tiu virino sufiĉe karikature plantis usonan stilon inter siaj subuloj. Ekzemple li postulis “teni rideton” (*keep smiling*). Dum tio ŝi ne ordis siajn dentojn.

– Por ŝi kiel por Gija ne estas pli insulta vorto ol malsukcesulo, – kunlaboranto rakontis. – Foje dum amikvespero je taso da kafo fraŭlaj sinjorinoj priparolis fraŭlajn virojn. Ili eksciis, ke mortis iliaj ĉies konato. “Ja mi parolis, ke li estas tipa *loser*[6]!” – Ketevan malestime komentis. Interparolo estis en kartvela lingvo, sed ĉefan vorton ŝi diris en la angla. Aliaj samaj usonigitaj sinjorinoj reagis pli diskrete kaj limitigis sin per rimarkoj: “Kiel kompate!”, “Kompatindulo ne havis feliĉon!” Bonokaze Ketevan estas maljuna virgulino, malbelulino kaj stultulino. Foje ŝi veturis al vilaĝo kaj post reveno ne kaŝis, ke ne baniĝis dum 10 tagoj...

Poste ni diskutis. Evidentiĝis ke en kartvela lingvo ne estas ekvivalento de rusa vorto “malsukcesulo” kaj la usona “*loser*”. Certe tio ne signifas, ke ĉiuj en Kartvelio estas destinitaj al sukceso. Ni parolis, ke venis nova tempo, venis novaj moralaj valoraĵoj. Ĉe usonanoj honte esti *loser*, kaj tio estas kompreneble. Usono estas lando de egalaj eblecoj, oni devas uzi ilin. Kvankam estas ne kompreneble, kio kunligis usona “*loser*” kaj rusa “malsukcesulo”?

Tamen estus ne juste enigi lin kaj ŝin en unu kompanio. Gija estas pli klera kaj pli saĝa. Ekzemple li gvidis seminarion pri “Dia komedio” de Danto en universitato. Senpage. Foje mi estis en lia leciono. Komence Gija laŭtlegis tekston en itala lingvo kaj poste en la kartvela. Foje la lektoro rakontis pri rondo de infero, kie estis gejoj. De ĉielo falis fajraj flokoj kun dimensio de neĝeroj. Ili brulvundis pekulo-gejojn, ili konstante devis desvingi

tiujn flokojn, forsvingi de si, esti en konstanta movo, kuri. Rakontante pri suferoj de pekuloj Gija mokis ilin per sarkasma tono. Dankema aŭskultantaro apogis lin. Kiam venis tempo por diroj de aŭskultantoj mi diris, ke tia bildo tre impresis, kaj ĝia priskribo en itala lingvo en prezentado de la mastro de seminario sonis tre bele.

– Tia senfortiganta sufero estas turmenta loto. Ĝi devas forpreni deziron al ajna homo, kiu estas komplica al gejismo, – mi rimarkis kaj tuj kritikis. – Danto multe permesas sin, igas pro tiu torturo iujn homojn, kies aparteno al gejoj ne estis fama aŭ pruvita, aŭ pri tia fakto povis scii nur aŭtoro. Tio estas malhoneste de lia flanko.

Tian kritikon Gija ial konsideris je sia konto kaj ne invitis min al sekva leciono. Interalie mi devas agnoski sinsekvon de la socia darvinisto, li ne indulgis eĉ sin. Iufoje erarpaŝinte Gija praktikis pro sarkasmo laŭ sia motivo tiel arde, kvazaŭ li mokus iun alian homon. Situacion savis lia rideto, kvazaŭ li ŝercis. Tia memkritiko el memhumiligaj formoj por plimulto da homoj estis neatendinta, tial ili ne impresis ĝin serioze kaj facile forgesis. Poste venis “sobrado”, kaj Gija silente insultis sin pro “sincereco kaj malmodereco”.

Sed unu okazon mi tre bone memorfiksis.

... En tiu tago li venis al nia oficejo ruĝa pro ekscitiĝo. Li videble estis malkontenta pro si kaj perfektiĝis per mokoj je sia konto.

– Estas bone, ke mi ne estas virino. Oni tiel simple povas inklinigi min.

Li detale rakontis pri okazaĵo.

Post eŭforio, kun kiu okazis membatado, Gija silentis kaj strečatente returniĝis...

Laŭ Tbiliso iris malbela junulo, kurdo laŭ nacieco. Frua senharaĵo nudigis lian “ĝustan kranion” (diro de Gija). Li havis tre neordinaran okupon. Li elkaptinte el homamaso iun dupon, aliĝis al li kaj komencis ĉatnaĝi monon. Li ne variigis temojn, ekzemple: “Ĉu vi estimas ŝtelistojn aŭ ne? Ili suferas en malliberejoj, malsanas pro tuberkulozo, helpu!” Oni povas supozi, ke la junulo havis inklinon por tiu tre riska okupo. Li devis elekti viktimon, dispremi ĝian volon, dresi. Se li erarus pro elekto de viktimo, li povus ricevi baton al sia “ĝusta kranio”. Ekzemple lin timigis mia kunlaboranto laŭ redakcio, sed ne Gija. En skvaro de universitato je 10 metroj de ĉefa eniro tiu arogantulo tenis kaj turmentis la sociala darvinisto dum du horoj laŭ partoj ĉantanĝante ĉe Gija “por bezonoj de ŝtelistoj” monon. Li ĝenerale ĉantaĝis 21 lariojn[7]. Preter iris multaj homoj. Iuj el ili salutis malĝojan Gija, kun kiu “karese” parolis juna homo.

Notoj:

1. *Griŝa* – karesa formo de nomo Gregorio.
2. *Guru* – orienta instruisto, saĝulo.
3. *“Ĝokonda”* – virina portreto de Leonardo da Vinci, fama itala pentristo de XV-XVI jarcentoj.
4. *Self-made man (angle)* – homo, kiu faris sin mem.
5. *Mengrelio* – regiono en Kartvelio.
6. *Looser (angle)* – malsukcesulo.
7. *Lario* – kartvela mono.

Esperantigis

Igorj Ĥomjakov

(Rusio)

_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_

Eldonas Redakcio de ***Penseo***
Ĉefredaktoro: s-ro Yida Wei (Vejdo)
Adreso: No.-3-2 de la 5-a etaĝdomo de No. 19, St. Wujiang, Jiangbei-Distrikto, Chongqing, 400020, Ĉinio
Tel: (023) 67095890 (hejme)
Retadreso: vejdo@163.com
Ĉiujn kontribuaĵojn al la ĉefredaktoro.
Por legi pasintajn numerojn de Penseo, vin turnu al www.elerno.cn/penlisto.htm aŭ http://gazetejo.org/eo/penseo

_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_